# LA PACDEFENDANTO

N-c.39. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Marto 1955


## TRAGEDIO MINACAS RIPETIĜI

Ĉiuj ĉeĥoslovakaj civitanoj memorigas la tragedian sorton, kun kiu renkontiĝis nia respubliko en la tagoj de la 15. marto 1939. Jam antaŭe Hitler kun siaj ekspertoj estis preparintaj la kampon de agreso. Estis sufiĉe da Ĉeĥoslovakoj, kiuj kuraĝis diri "Pli bona Hitler ol Stalin" en la espero ke Hitler al ili helpos plue ekspluati iliajn samnacianojn.

La Slovakojn li sukcesis instigi al batalo kontraŭ la Ĉeĥoj sub la devizo "Slovakion al la Slovakoj !" Aliaj naive akceptis la trompon de la nazi-istoj, ke ĉiun mizeron kulpas la Judoj kaj diversloke, ankoraŭ antaŭ la alveno de la germanaj armitaj faŝistoj, okaziĝis pogromoj kontraŭ la Judoj. Trimilionan germanlingvan civitanaron sub gvido de sia marioneto Konrad Henlein, logantaj plejparte en la t.n. Sudetoj li furiozigis kontraŭ Ĉeĥoslovakio por aliĝigi ilin kun ilia teritorio al Hitler-Germanio. Li sukcesis funkciigi perfekte la malamon kaj disharmonion inter la tiam ankoraŭ diversnaciaj popoloj de Ĉeĥoslovakio.

Sed malgraŭ ĉio, la komunistoj kaj ĉiuj progresemaj homoj, kiuj estis konsciaj pri la danĝeroj, kiujn alportas faŝismo, sukcesis en tiu ĉi situacio mobilizi la popolojn al unueca batalo kontraŭ ĝi . Sekvis grandaj mitingoj kaj amasaj kunvenoj, kie la homoj unuece prezentis sian firman volon defendi la respublikon, malgraŭ la mizero kaj senlaboreco, kiun ili en ĝi spertis, kontraŭ la Hitlerbanditoj, kiuj alportus ankoraŭ pli grandajn terurojn.

La batalo atingis sian alternativon. Multaj antifaŝistoj el la germanlingvaj, polaj kaj slovakaj regionoj de nia ŝtato devis rifuĝi antaŭ la furiozantaj faŝistoj en la internajn ĉeĥajn regionojn de la respubliko por savi siajn vivojn, forlasinte sian tutan havaĵon. La situacio fariĝis pli kaj pli streĉita. Streĉite ankaŭ la homoj aŭskultis ĉe la radioaparatoj, kio okaziĝos.-

Ni ankaŭ havis kontrakton kun Francio, Anglio kaj la Sovjetunio kiuj estis niaj aliancanoj kaj devus nin helpi en kazo de bezono. Sed, kvankam la popoloj de Francio kaj Anglio forte deziris apogi Ĉeĥoslovakion kontraŭ la agresoj de Hitler, iliaj registaroj, rompante la kontrakton rifuzis al ni sian helpon sub la pretektsto, ke la malgranda kaj ne vivkapabla Ĉeĥoslovakio nevaloras verŝi sangon kaj eventuale iniciati mondmiliton. Fine La Sovjetunio restis izolita, kaj finfine eĉ minacita, ke en kazo de ĝia interveno por helpi nin, Francio, Anglio kaj ceteraj kapitalistaj registaroj estus jetintaj siajn armeojn kontraŭ ĝi, por estingi la al ili danĝeran bolŝevismon.

Kaj tamen Sovjetio proponis al ni sian helpon kontraŭ la armeoj de Hitler, sed la tiama ĉeĥoslovaka registaro, estinte dis-partigita je du sin kontraŭantaj partoj, rifuzis la helpon de

Sovjetio kaj preferis kapitulacii antaŭ Hitler. Tiamaniere Hitler ricevis senbatale la tutan militan arsenalon de ČSR. Kaj ĝi ne estis malbona !

Sekvis mallumaj tempoj por la tuta popolo, arestigoj, morttransportoj, murdado, koncentrejoj, gasejoj kaj ceteraj eblaj kruelaĵoj. La popolo trapasis inferon, kiu devus esti por ĝi lernejo. Sed ankaŭ aliaj nacioj pliposte same spertis.

De tiu tempo pasis 16 jaroj. La homoj rapide forgesas mizerojn. Novaj militinstigantoj montriĝas sur la scenejo kun malnovaj generaloj kaj nove elkreskinta generacio, kiuj publike minacas per atom- kaj hidrogen-bomboj. Ĉu ni povas allasi ripetiĝon de ankoraŭ pli kruela tragedio ?

Rudolf BURDA

## SIN SUBSKRIBU POR LA PAC'

De Nikolaj STAJKOV.

Nu, jen la patri- la suno brilas
en la spaco, venas boncdor ,
ĉiam novaj, oraj homoj trilas
en la lando bela de labor.
Se vi ĝojas je levig ilia ,
ilin helpu frate vi sen lac' ,
faru al popolo devon vian
subskribante por la daura pac' !

Sciu: liston, kiun vi subskribos
transformiĝos en baranta firm ,
ĝi al vi donados rajton spiri,
por infanoj viaj estos ŝirm' .
Partoprenos ni decidlabore, ,
nun subskribe luktu en batal' ,
al imperdinerta agresoro
vi subskribu akton de fatal' !

Nun militas milionoj por la paco
blankaj, nigraj, flavaj -tuthomar,
gardpostenas sur terglobsurfaco
granda la porpaca amikar' .
Batalad' porpaca estas sankta,
sed por ĝia sukcesplena fin'
vin viciĝu inter batalantoj - ,
sub alvok' subskribu vi sen tim' !

El bulgara lingvo tradukis:
k-do. MURGIN Canko - Sofia

MENDU ANKAŬ POR VIAJ EKSTERLANDAJ GEAMIKOJ NIAN BULTENON !
La jarabono por 1955 = 13.-Kčs

## POR MILITO ABOMENA !

Nur antaŭ jardek' eksilentis
kanonoj de monda milito -
tre longe lamentis
milmiloj de ar suferita.

Milit' nun pli iĝis malŝata -
ĉar scias ĝin multaj persone
ĉar estas ĝi monstro konataklariĝi, ĉu estas bezone ?

Gejunaj memstare ne spertas
pri ĝi, sed ĉu estas necese ?
Ruinoj eĉ nun avertas,
viktimoj akuzas senĉese....

\+
\+ \+

Kaj bomb' hidrogena..atoma..
ekestis jam monda danĝero -
ne helpas kompato alhoma,
se venus milita infero.

Pac-fronte ni vigle ekstaras
insidas nin nova milito,
Uson agresor ĝin preparas
por sia plej propra profito.

Ho, ĉu senespere ni statos?
Ho, ĉu ni atendu nur veon ?
-Ne! Imperiiston ni batos,
atingos li...sian pereon !

\+
\+ \+

Ariĝu, ho, pac-defendantoj
el kampo, fabriko, uzino -
ke ĝoje eksonu nur kantoj
ke paco daŭriĝu sen fino !

Ni kantu, sed ankaŭ ni agu
ĝi estas la nedisiĝebla -
milito ke plu ne ekvagu,
hom-buĉo fariĝu neebla !

Bravega anaro, = POR PACO ! =
ĝi estu devizo amata,
ĝi regu sur tera surfaco
por hom-estonteco bonstata !

Orig. de MURGIN Canko

## LA JUNULAR-FESTIVALO- VARSOVIA

La pola Esperanto-Asocio fervore agas por arangi renkontiĝon de junaj esp-istoj dum la Mondjunulara Festivalo en Varsovio. Ĝi nun bezonas vian helpon. Skribu tuj al via landa festval-komitato kaj al la Mondjunulara Festival-Komitato, Mokotovska 3, WARSZAWA, ke ili arangu tion kaj sendu al vi la bezonajn prospektojn.

BERTIT Englund

**NIA TUTŠTATA KUNVENO de esperantistaj pacdefendantoj**

okazigos la 7an,8an,9an kaj 10. de julio en OTROKOVICE ĉe Gottwaldov /Moravio/.
Ĉar nia grupo en Otrokovice mem ne estas tiom forta,por povi fari ĉiujn necesajn laborojn dum la akcepto de partoprenontoj,ni petas gek-dojn el proksimaj lokoj al kunlaboro.Ili kontaktu kun la Organiza komitato, k-dino.Fany MATUŠOVÁ,Krátká 812 OTROKOVICE.
ALIĜILOJ: Ili estas jam en preparo.Eble kun la venonta/aprila/ n-o. ni ĝin kunsendos al ĉiuj abonantoj de L.P.kaj PACO.Aliaj gek-doj.povos ĝin ricevi rekte de la Organiza komitato en Otrokovice.
EKSTERLANDAJ PARTOPRENANTOJ: Jam anoncis al ni sian partoprenon gek-doj.el Hungario,Polio, Francio,Bulgario,Austrio,Svedio Anglio kaj Danlando.Ankaŭ el D.D.R.kelkaj alvenos.
ĈSR.: La intereso por nia TUTŠT. KUNVENO inter la ĉsl.gek-doj estas granda.Tutaj grupoj ĝis nun pronesis sian partoprenon. En multaj rondetoj fondiĝis VOJAĜA FONDUSO,en kiu la gek-doj.jam nun ŝparas nonon por la vojaĝelspezoj al Otrokovice.
FAKAJ KUNVENOJ: Kuracisto,d-ro. Josef ČERNÝ intencas pripraroli plejtaŭgan metodon de Esp-o kaj pacpropagando en kuracistaj kaj parencaj rondoj.Proponojn,konsilojn kaj kontribuajojn,kiujn necesas prepari al diskuto por la fak-kunveno,bonvolu jam nun sendi al k-do.Dr.J.ČERNÝ,Nám.Republiky č.22/II. PLZEŇ.
ATENTIGO: Ni decidis aranĝi nian TUTŠTATAN dense kun la tutŝtata gimnastika SPARTAKIADO, Kial ? La Spartakiado komencigos la 23. 6.kaj finiĝos la 6.7. Do unu tagon antaŭ la komenco de nia TUTŠTATA. Multaj eksterl.gek-doj eble kun intereso rigardos nian Spartakiadon kaj poste venos viziti nin.La ĉsl.registaro havas eminentan intereson alvenigi kiel eble plejmultajn eksterland. gastojn.Tiuj tre verŝajne havos diversajn privilegiojn.La ĉefa estas,ke ili facile ricevos ĉsl. enirpermeson. La ĉsl.gek-doj devas jam nun atentigi siajn eksterlandajn korespondamikojn pri tiuj favoraj ŝancoj kaj instigi ilin,peti ĉe niaj ambasadoroj jam nun enirpermeson por la tempo de 20a junio ĝis 15a julio kun la deklaro,ke ili deziras viziti la Spartakiadon kaj petu ankaŭ tiurilatajn prospektojn. Por postuli enirpermeson al nia TUTŠTATA,la ŝancoj ankoraŭ ne estas favoraj.

**A D R E S A R O**

**DE ĈEĤOSL.ESP.-PACDEFENDANTOJ**

Ni pronesis eldonon de la adresaro por la monato februaro. Hodiaŭ ni devas kun bedaŭro konstati,ke la cirkonstancoj ne permesis al ni plenumi tiun taskon. Ne estas nur nia kulpo.Kvankam la netoskribo kaŭzas grandan laboron,ĉefe kulpas niaj gek-doj,kiuj pro sia pasiveco ĝis nun ankoraŭ ne pagis sian jarabonon.
Ni ja nepovas publikigi en la adresaro nomojn de gek-doj., pri kiuj ni nesciâs ankoraŭ ĉu ili pretas renovigi sian anecon. Ni do insiste petas ĉiujn niajn legantojn,ke ili egaligu sian ŝuldon por LA PACDEFENDANTO,kiu faras 12.-Kčs kaj ĉe abonantoj de PACO 13.-Kčs. Nur tiam eblas publikigi iliajn adresojn.Gek-doj. kiuj nuntempe militservas kaj ricevadas nian bultenon al adreso de kazerno,rapidu al ni sendi sian civilan adreson,ĉar publikigi la soldatan adreson,validus ne longtempe.
Ankaŭ niaj eksterlandaj legantoj,kiuj deziras publikigon de sia adreso,estas petataj iamaniere rekompenci al ni la alsendon de nia bulteno.Ili aŭ pagu per sia mono al niaj perantoj,kie ni tiajn havas,aŭ rekompencu al ni per sendo de broŝuro,kiun ni povus ĉe ni vendi.
Gekamaradoj,kiuj pro certa kaŭzo estas nekapablaj renovigi sian jarabonon,sciigu tion almenaŭ per p.k.al nia redakcio,por ke ni publikigu ankaŭ iliajn adresojn en nia adresaro. Ju pli rapide vi agos,des pli frue vi ebligos gian eldonon.

La red.

## NI ELUZU LA OKAZON !

Lastatempe montriĝas du okazojkie ni,ĉeĥosl.esp-istoj estas povantaj prezenti al ĉiu dubanto la uzeblecon de Esperanto kaj giajn avantaĝojn. Ni fakte povas praktike uzi Esp-on por sufiĉe gravaj aferoj.

La unua afero estas livero de multaj kaj taŭgaj kontribuaĵoj por la 15voluma japana porinfana libro "INFANOJ DE LA MONDO". Laŭ mia opinio,partopreno de ĉeĥosl. esperantistaro en ĉi tiu verko estus la provŝtono de nia preteco montri praktike la uzeblecon de nia lingvo. Sed videble la nombro de kontribuantoj en nia lando ne estas tiom granda,kia ĝi indus esti. La kondiĉojn de kontribuo al tiu verko,trovos ĉiu interesulu en unu el la lastaj n-oj.de LA PACDEFENDANTO. La afero mem ne estas limigita nur al la agad-kampo de instruistoj,sed devas esti intereso de ĈIU nia samideano,kiu kontaktas kun infanoj 5-14 jaraj ĉu propraj,ĉu kun tiuj de siaj najbaroj kaj konatuloj, igi ilin verki rakonteton aŭ desegnaĵon laŭ ilia propra vidpunkto kaj tute memstare.Poste prizorgi gian Esp.-lingvan tradukon /aŭ mem,aŭ fare de kluba kolektivo/ kaj sendi gin al la redakcio de "INFANOJ DE LA MONDO" ĉe HEIBONSYA,Yonbantyo,Tiyodaku,TOKIO, Japanio.

La dua afero,kie ni nepre montru nian pretecon kaj aktivecon, estas kontribuo al la projektita verko de nederlanda s-ano. H.W. Alings,Middenweg 226,AMSTERDAM O. pri DOMSIGNOJ. Ĝis nun partoprenas en tiu ĉi afero nur Praha, Cheb kaj Hradec Králové. Kie restas niaj samideanoj el la ceteraj ĉsl.urboj ? Ĉu tiaj domoj,kiel ekzemple "U Jonášů" en Pardubice aŭ "U Rytířů" en Lytomyšl ne meritas mencion en la verko de la nomita samideano ? Tio dependas nur de ni mem.Neniu alia faros nian laboron anstataŭ ni. Do vi ĉiuj,kiuj ne ĉesis labori per kaj por Esperanto,informiĝu en la 16. r-o.de la BULTENO de Praha.

Estas jam vere tempo,kiam propagando de Esperanto devas akcepti aliajn formojn ol nur estas simpla elmeto de belaj bildoj en montrofenestron aŭ propagandakeston. Ni ekagu laŭ la sperto,ke la plejefika formo de propagando ĉiam nur estas gia praktika uzo. Kaj se ekestas okazo por tion fari,ni ne rajtas gin lasi preterpasi sen sufiĉe da atento,sed ni devas el-uzi gin ĝis profunde !

Multan sukceson al via laboro! Montru,ke Esperanto en Ĉeĥoslovakio estas uzata kaj praktike utiligata !

Zdeněk HRŠEL
Hradec Králové

## KION OPINIAS DANA K-DO.

El letero de nia danlanda amiko:

.....mi ĝojas aŭdi,ke vi preparas arangi Tutŝtatan kunvenon de esp-istaj pacdefendantoj en via lando. Dankon por la invito.

Tre volonte mi vizitus gin,se miaj ferioj okazos samtempe. Ĉu ne estos dangera por mi,kiu venos el "kapitalista" lando al via lando por partopreni kunvenon, kiu estas malŝatata aŭ eble eĉ malpermesata de viaj superaj instancoj ?

Tamen mi volonte venus - parte por propraokule vidi,kiaj estas la vivkondiĉoj en la "orienta mondo",pri kiu mi jam aŭdis tre multon,al ĝi neoportunan.- Ĉu vi povos sciigi al mi la precizan daton de via kunveno kaj kie okazos la Spartakiado? Ĉu en Praha?

Ĉu vi pensas,ke mi entute akiros enirpermeson por la gimnastika Spartakiado ? Oni eble konsideros min usona imperialista spiono.

Mi estus al vi tre dankema por pluaj informoj pri tiu entrepreno.

Willy NIELSEN
Kirkegaardsvej 54,HJØRRING,Danio

La redakcio atendas,ke niaj legantoj mem respondu al k-do.W.N.

## ABONANTOJ DE "PACO"

Bonvolu renovigi sian jarabonon por 1955 /13.-Kĉs/ ĉe nia peranto,k-do.Fr.LIĈKA,Březí 12,OSTRAVA-Zábřeh. Novajn abonantojn nun ni ne povas plu akcepti.

NENIU KONSTRUAĴO POVAS KOMENCI DE SUPRE

Tio klare evidentiĝas el letero, kiun ni ricevis de germana k-do. L. Schödl:

"..... ekzistas en GDR efektiva malpermeso, arangi Esperanto-kursojn kaj propagandi Esperanton. Pli grave estas ankorau la klara kontraua sinteno de la Socialista Unueca Partio/SED/. Tio signifas, ke membro de la SED ne simple povas propagandi Esp-on au eĉ arangi kurson. Povas okazi kaj kelkfoje okazis, ke tia SED-ano estas eksigita el la partio. Kiel eksmembro, li en ŝtataj funkciojn ne estas tolerebla kaj cetere perdas influon generale, ankau kiel propagandisto de Esp-o. Preskau ĉiuj funkciuloj iamaj de GLEA au de IPE nun kaŝas eĉ, ke ili scias Esp-on, por ne esti konsiderataj kiel opoziciuloj. Mi neapartenas al tia sorto/speco/ kaj konstante aplikis Esp-on kaj defendis mian agon kelkfoje en arda diskutado kun diversaj partiaj instancoj. Sed jen eta afero: Por kongreso de iamaj rezistintoj kontrau la Hitler-regimo, okazinta en Vieno, nia sindikato serĉis delegiton kaj elektis min/ne ekzistas multaj rezistintoj agnoskitaj, inter la geinstruistaro kaj krome, mia porpaca laboro estas konata/. Nun mi devis skribi biografion, kiu venis al la Centra Komitato. Mi ne estis agnoskita de ĝi por Vieno, sendube pro mia peresperanta laboro. Nu, mi ne ploras pro tio, sed jen la Kialo, kial ĉiuj strebuloj perfidas nian movadon.

Ekzistas alia grava malhelpo: ĉiu kunveno devas esti oficiale permesita de la polico. Polico neniam permesas kunvenon de esperantistoj kaj plej multaj homoj timas iri al kunveno, neanoncita. Ĉiu presita au multobligita teksto devas havi registritan n-on. Ricevi tian prespermeson estas tre malfacila. Nur tre forta organizaĵo, kiel ekz. Germana Paca Konsilantaro povus atingi tion por iu Esp-aĵo, -sed tio tute ne estas certa. Por Esp-grupo au individulo tio estas tute neebla. La punoj kontrau malobeo de tiu dekreto estas severaj. Do tiel longe, kiel ekzistos la dekreto kontrau Esperanto, certe ne eblos eldoni "PACON".

K-do. Schödl skribas, ke li havis kelkajn diskutojn kun ano de sekretariaro de Germ. Packom. por konvinkigi ilin pri la valoro de Esp-o., sed la fina rezulto estis negativa. Li nun diras ke la sola efika vojo estas: rediskuti ĉi aferon kun la Centra Komitato de SED. Se tiu estos por forigo de la dekreto, tiam tio estos, se ne, ĝi restos. Sed tion ne povas fari iu. Mi legis ekzemple leteron de k-do. Glöckner al Germana Packomitato. En ĝi troviĝas la vorto "Ruĝ-Ĉinio". Tia eraro estas neriparebla. K-doj. nur parolas do Ĉina Popola Demokratio au de Popola Ĉinio. La esprimo "Ruĝ-Ĉinio" estas gargono de niaj malamikoj. Do tia letero estas bonega argumento kontrau ni, ĉar niaj malamikoj tuj diras: jen vi ja vidas, kiaj homoj tiuj esperantistoj estas! Rilati kun partia centra komitato nur povas k-do., kiu mem parolas "partian lingvon" kaj de kiu oni scias, ke li ĉiam kondutis partiece."

Ĝis ĉi tie la raporto de k-do. L. Schödl.

Mi opinias, ke ne la homoj, kiuj volas rilati kun la partia alta instanco, devas scii la "partian lingvon", sed male: Lenin eĉ Stalin proklamis, ke la funkciuloj de la partio "devas havi sian orelon dense ĉe la amaso", tio signifas, ke ili ne nur auskultu la voĉon de popolanoj, sed ankau laueble respektu iliajn dezirojn kaj ne estu diktatoraj kun escepto rilate kapitalistajn elementojn. Necesas al niaj gek-doj. ankorau multe lerni el la historio de la partio, ĉar giaj spertoj devas esti lernejo ankau por ĉiuj ceteraj homoj kiuj sentas sin batalantoj por bono de la homaro. Sekve ankau por ni! Kaj el ties historio ni lernas, ke veraj partiaj batalantoj ne niam demandis la regintajn superajn instancojn, ĉu ili permesas.

R. BURDA

VOJAĜU AL ČSR !

Laŭ informoj,kiujn mi enketis en vojaĝoficejo EXOD,TURISTA kaj generala direktorejo de ČEDOK en Praha II,Václavské nám./eniro el Vodičkova ul./estos ĉi jare ebleço por eksterlandanoj viziti Ĉe-ĥoslovakion.

Okaze de la 10a datreveno de la liberiĝo de ČSR el la germana jugo naziista,estas en preparo tutŝtata gimnastika festo"SPARTAKIADO"en Praha.Niaj vojaĝoficejoj subtenos grandskale la vizitontojn per vojaĝrabatoj kaj aliaj faciligoj.

Tiun okazon mi volas eluzi,por gastigi eksterl.k-don./inon/dum la SPARTAKIADO kaj nia TUTŜTATA en mia hejmo. Proponojn skribu al k-do: Karel KRAFT,Županovice,p. HŘÍMĚŽDICE u Dobříše,Ĉeĥoslovakio

MI ESTAS NUR SIMPLA TERKULTURISTO

sed,mi ne volas stari flanke, kiel ĝis nun. Batali por la Paco ni devas ĉiuj, tio estas krom alia ankaŭ kristana devo !

Stanislav MAYER
Troubelice č.46.

Por siaj leteroj k-do.Mayer uzas jenan ŝtampilon:

ESPERANTO
unu lingvo por la tuta mondo
ĝi estas la unua perspektivo por
la daŭra paco!

/la teksto estas nacilingva/

MEMORIGO JE PIONIRO

65 jaroj pasis de post la naskiĝo de J.František CHALOUPECKÝ /28.?./fondinto de la unua "Laborista Unuiĝo Esperantista"kiel fako de tiama "Laborista Akademio" en nia ĉefurbo Praha.Tio estis en la jaro 1911.En 1922 komencis Chaloupecký eldoni propagandan ĉeĥan-esperantan gazeton."LA KULTURO",kiu turnis sin senkaŝe al laboristoj,konsciantaj sian apartenon al batalanta klaso.Lia iniciato trovis rimarkindan resonon kaj lia gazeto estis redaktata sur respektinde alta nivelo.Chaloupecký aliĝis al la Komunista partio tuj post ĝia fondiĝo.Lia speciala laborkampo estis gimnastiko.Li estis iniciatinta la I. čsl.SPARTAKIADON en Praha, Na Maninách.En aprilo 1922 li mortis ankoraŭ juna.Lia enteriĝo tiam fariĝis impona manifestacio de komunistoj dankepor liaj grandaj aktivecoj por la progreso de la batalo de ĉeĥosl. laboristoj.

St.KAMARÝT

AL LA ABONANTOJ DE "MÍR"

La Ĉeĥoslovaka Komitato de Pacdefendantoj en Praha XI., Kalininova 5,informas ĉiujn abonantojn de la monata nacilingva bulteno "MÍR"/Paco/,ke tiu ĉesis plu aperi ek de la 1. januaro 1955.Ĝia likvido estis decidita tial,ĉar la batalo por konservi pacon kaj amikan kunvivon de la nacioj eniris pluan decidan stadion,dum kiu necesas decide kaj ĝustatempe reagadi la internacian politikan situacion. Tiun ĉi taskon,kiun plenumas la tuta čsl.taga kaj semajna gazetaro,nepovis la bulteno "MÍR /Paco/,kiu aperis unufoje monate,ĉe la plejbona volo plenumi. Por funkciuloj de la pacmovado aperos duonmonata informa cirkulero.

Čsl.Komitato de Pacdefendantoj

---

N I A  M O V A D O  E N  Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

JABLONNÉ n/Orlicí,k-do.St.Werner el Těchonín fondis ĉi tie grupon en la 8jara Mezlernejo.La 16/2. komencigis kurso kun 20 gelernantoj.Instruas k-do.St.Werner.

BRATISLAVA,ankaŭ nia rondeto festis la naskiĝtagon de LL.Zamenhof. Konferencadis k-dino.Kiss,festparolis k-dino,d-rino.Seppová. La programon aranĝis gek-doj.Seeman, Finková,Weisová,Staron kaj Lipták La 12.1.vizitis nin k-do.A.Stanura el Ostrava,kiu prelegis pri Esstenografio.Ni kunvenadas ĉiu merkrede de 19-22.horo en Odborárské nám.3.

KARLOVY VARY,funkcias kurso kun 5 lernantoj.Instruas k-do.P.Tichota.

Ni kunvenas en klubo de pacientoj de la ROH-instituto.La loka gazeto "Stráž Míru"favore mencilis nian agadon.La lastan februaron ni haviş letervesperon.Ĉiuj jam preparigas viziti la Tutŝtatan kunvenon en Otrokovice.
OSTRAVA,la 16/2.komencigis kurso por komencantoj en uzina klubo de ferfabrikejo Kl.Gottwald-Vítkovice-Zámek.Por progresintoj instruas k-do.Slaný ĉiu merkrede de 16a horo.La 19/1.okazis komuna prelego por membroj de ĝarden-posedantoj kaj esp-istoj pri floroj,fruktoj kaj legomo.K-do. Fr.Lička prelegis pri tutmonda pacmovado.Ni arangis ciklon da lumbildparoladoj pere de k-do.instruisto Josef Vítek pri la temo,"Laplando-tero kaj homoj post la polarcirklo".Tiujn prelegojn partoprenis: en Kultura Domo de ministoj el Karviná,proksim. 550 infanoj,vespere 250 maturaj homoj.En polia lernejo de Karviná ĉeestis 200 infanoj kaj 8 geinstruistoj,en lernejo de Třinec ĉeestis 82 gelernantoj kaj 12 instruistoj,vespere en la Kultura Domo estis ĉ.350 homoj.La 24/2. en Meza lernejo de Třinec ĉeestis 200 infanoj kaj 8 instruistoj En uzina klubo de "URX"Ostrava-Zábřeh ĉeestis 150 personoj.En la urbo Olomouc en sindikata klubo partoprenis 220 personoj.En ĉiuj prelegoj k-do.Vítek prpagandis Esperanton.Paroladon de k-do. Fr.Lička pri tutmonda pacmovado partoprenis 60 personoj. Funkcias kurso kun 25 gelernantoj.La 27 de marto je la 9a matene okazigos komuna kunveno de Esp-rondetoj el la regionoj de Olomouc kaj Ostrava en la Kultura Ĉambro de la Ŝtataj Fervojoj en urbo BOHUMÍN. Ĉiuj gek-doj estas kore invitataj
ŠLUKNOV,antaŭ 2 jaroj la plejgranda parto de nia rondeto,konsistanta el junularo-komencantoj,devis foriri al militservo kaj ankoraŭ ne revenis.Post foriro ankaŭ de nia gvidanto,d-ro.Jakubec la ceteraj unu post la alia ĉesis al veni la kunvenojn kaj mi restis sola. Sekve neplu sendu korespondaĵon al nia rondeto,Železniční stanice,Nádraží ŠLUKNOV,sed al mia adreso: Jos.LEDERER,ŠLUKNOV č. 581.ČSR. Mi volas klopodi varbi novajn adeptojn kaj ankaŭ abonantojn por "L.P."
CHOTĚBOŘ,en distrikta kunveno de pacdefendantoj la 26/2.prezentis k-do.d-ro.St.Kamarýt nian publikaĵojn pri apliko de Esperanto por defendo de paco. Fine li proponis,ke la kunveno rekomendu al la Centra Komitato de Pacdefendantoj en Praha, ke tiu sendu sian observanton al nia Tutŝtata kunveno en urbon Otrokovice.La propono renkontigis kun generala aprobo kaj la estraro promesis,gin transdoni per aparta letero al la Centra Komitato en Praha.
PLZEŇ,funkcias kurso kun 12 gelernantoj.Instruas d-ro.Černý. La 9/2.okazigis diskuta vespero de legantoj de L.P.En vigla diskuto,kiun partoprenis 13 membroj,oni generale aprobis la gisnunan direktivon de L.P. Tio signifas,ke gi restu sur la nuna vojo,akceptu raportojn de ĉiu pacamanto senrigarde lian politikan,religian aŭ nacian inklinon.La junularo riproĉis mankon de raportoj pri la junulara movado,sed la redaktoro defendis,ke oni devus tiajn raportojn antaŭe al li sendi. Nia gen.jarkunveno okazigos merkrede,la 6.de aprilo de 19a h. en restoracio "U Fišerů" Plzeň, Sedláčkova 39 kun interesa programo.Ni atendas partoprenon de ĉiuj membroj kaj multaj gastoj.
LIBEREC,k-do.Mařík,la prezidanto de trafiklaborista sindikato en Praha,malpermesis doni iun-ajn subtenon por Esp-o. Sekve ni devis adiaŭi kun la fervojista klubo kaj aligi nian rondeton ĉe la Kultura Domo de Liberec.La 18/1.ni havis jarkunvenon.Estis elektita nova komitato: k-do.Sláva Pytloun-prez., d-ro.B.Jakerle,J.Hudec,Pytloun Frant. kaj H.Schmidt kiel ceteraj funkciuloj de la komitato. La kunvenon ĉeestis ankaŭ k-do. S.Půlkrábek-direktoro de la Kultura Domo kun sia edzino. K-do. Frant.Pytloun,Leninova č.518/4a estis elektita peranto por "LA PACDEFENDANTO".
FINE NI PETAS RAPORTOJN PLUAJN!

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S :

K-do.KULÍŠEK Miroslav,Palackého nám.č.17,PLZEŇ,Čeĥoslovakio, kun čiuj landoj.Certe respond.

K-do.Zdeněk LEGERSKÝ,U nových válcoven č.10,OSTRAVA-Hulváky, Čeĥoslovakio,kun 15-25 jaragaj per leteroj kaj il.p.k.

K-do.Alexandre LENGAGNE, 70,rue Jean Jaurés,DESVRES /Pas-de-Cal/ Francio,oficisto en fajencejo, deziras koresp.pri fajenco.

K-dino.Anna NOHOVÁ,Barrandova 31, PLZEŇ,Čeĥoslovakio,interšangas il.p.k.kaj p.m.kun čiuj landoj.

K-do.ZÁVODSKÝ Míro, Závodie 197, ŽILINA,/Slov./Čeĥoslovakio, tre deziras ricevi Esp-gramofondiskojn.Li pagos aŭ rekompencos per materialo laŭ deziro.Skribu tuj.

K-do.vojín F.FARA,P.S.12/U,PARDUBICE,Čeĥosl.kun čiuj landoj.

K-do.Géza HAUPTR[illegible]CHT,F.Satnu 8, BAIA-MARE,Romani[illegible],kun č.landoj.

K-do.Ladislav HO[illegible]ZEK,Hradní č. 25/42,OSTRAVA VI[illegible]I.Čeĥoslovakio kun artpentristo, per krajonaj aŭ penikaj,por interšangi spertojn,siajn verkojn kaj vidajkartojn kun čiuj landoj.

K-do.Josef HOŘEJŠÍ,Domov ZVIL, Čechova ul.,PLZEŇ,Čeĥoslovakio, pri čiuj temoj kun č.landoj.

K-do.Ewald MAYER,CUNERSDORF üb. Königstein/Elbe,Germanio-D.D.R. interšang.il.p.k.kaj p.m.

K-do.Karel ČINČERA,Pivovarská č.177/26,DĚČÍN IV.,Čeĥoslovakio per il.p.k.kun čiuj landoj.

K-do.Vilo TRETIAK, Červeňany, pošta ŠIRK,okres Revúca,Slovensko,Čeĥoslov.,kun čiuj landoj pri čiuj temoj /studento/.

---

Unufoja publikigo de 3linia korespondanonco kostas 3.-Kčs aŭ 3 internaciajn respond-kuponojn.La anoncantoj estas devigitaj almenaŭ unufoje per il.p.k.respondi al čiu petanto.

---

## M U N I C I O   P O R   N I A   B A T A L O

| | |
|---|---|
| K-do.Cor de Waart,Plzeň | 2.-Kčs |
| K-do.J.Kubín,Ostrava-Mar.H. | 5.-" |
| K-dino.J.Faltýnková,Val.Mez. | 3.-" |
| K-do.J.Mařík,Praha | 8.-" |
| K-do.K.Janda,Kralupy n/Vlt. | 7.-" |
| K-do.K.Dušánek,Chrudím | 5.-" |
| K-do.J.David,Hl.Životice | 5.-" |
| K-dino.F.Matušová,Otrokovice | 8.-" |
| K-dino.B.Dyčková,Bochoř | 3.-" |
| K-do.A.Frantl,Opava | 10.-" |
| K-do.J.Raška,V.Bystřice | 3.-" |
| K-do.K.Dejmal,Praha | 3.-" |
| K-do.J.Mazánek,Ostrava | 8.-" |
| K-do.V.Trojan,Žacléř | 76.-" |
| K-do.K.Svoboda,Mlýny | 4.80 |
| K-do.J.Kazda,Karl.Vary | 3.-" |
| K-dino.Vybulková,Hrad.Král. | 10.-" |
| K-do.F.Veselý,Ostrava | -.60 |
| K-do.D.Zubek,Karviná | 6.-" |
| K-do.F.Kubasiak,Karviná | 6.-" |
| K-do.E.Gold,Karviná | 6.-" |
| K-do.J.Pastušek,Karviná | 1.-" |
| K-do.F.Svačina,Lanžhot | 4.-" |
| K-do.J.Kazda,Karl.Vary | 12.-" |
| K-dino,V.Králová,Litvínov | 25.-" |
| K-do.St.Mayer,Troubelice | 3.-Kčs |
| K-do.J.Chomen,Ml.Bolesl. | 5.-" |
| K-do.J.Křivohlavý,Karl.V. | 1.-" |
| K-do.N.Čekal,Děčín | 8.-" |
| K-do.F.Lička,Ostrava | 75.-" |
| K-do.F.Skoupý,ŠEBROV | 5.-" |
| K-do.R.Hromada,Praha | 8.-" |
| Serganto Ešpandr,Strašice | paper. |
| K-do.C.Fišer,Popůvky | 3.-" |
| K-do.V.Horák,Karl.Vary | 2.-" |
| K-do.A.Zmeškal,Praha | 7.-" |
| K-do.J.Hajzok,Bratislava | 2.-" |
| K-do.T.Novotný,Liberec | 3.-" |
| K-do.ing.Kochmann,Praha | 8.-" |
| K-do.R.Lipka,Darkov | 8.-" |
| K-do.J.Lička,Karl.Vary | 15.-" |
| K-do.K.Kraft,Zupanovice | 15.-" |
| K-do.E.Przeczek,D.Suchá | 3.-" |
| K-do.J.Kavulok,Karviná | 6.-" |
| K-do.ing.Karpeta,Karviná | 6.-" |
| K-do.A.Odehnal,Karviná | 6.-" |
| K-do.R.Tomiczek,Karviná | 9.-" |
| K-do.ing.Řebíček,H.Brod | 14.-" |
| K-do.J.Hopf,Nové Sedlo | 9.-" |
| K-do.Zd.Hršel,Hr.Král. | paperon |

Čiuj gek-doj akceptu nian tutkoran dankon !

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO,TATRA,n.p.KOPŘIVNICE.
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.č.6,PLZEŇ, Č.S.R.
Jarabono: 12.-Kčs aŭ 15 resp.kup.Korespondadreso: la redakcio.